


AMERIKA ESPERANTISTO

# AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE



*World Needs Esperanto*  
by Paul Nylén

*The Voice of America*  
Esperanto Programs

*Esperanto in Action*  
Around the World

*La Kanto pri Hiavata*  
Kanto V, VI, VII

4

1960



# AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

*Official publication of the*

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, Inc.

114 West 16 St., New York 11, N. Y.

*Editorial Staff:* George Alan Connor, Dr. William Solzbacher, Doris T. Connor, and Myron R. Mychajliw.

*Sustaining Board:* Ralph H. Beard, Dr. Luella K. Beecher, A. M. Brya, C. Cummingsmith, Dr. Lee-Min Han, Austin Herschel, Anonymous, Allan Hutcheon, J. Archie Johnson Jr., Paul J. Kovar, Bertha E. Mullin, Anonymous, Bertha F. Sloan, Harold S. Sloan.

---

## CONTENTS – ENHAVO

Today's World Needs Esperanto .....	<i>Paul Nylén</i>	51
Voice of America Esperanto Programs .....	<i>W. S.</i>	53
Esperanto in Action Around the World .....		54
Esperanta Kroniko .....		56
Kantoj pri Hiavata, <i>tr. Ernest G. Dodge</i> .....	<i>Henry W. Longfellow</i>	57
Kanto V – Fastado de Hiavata .....		57
Kanto VI – Amikoj de Hiavata .....		60
Kanto VII – Boatado de Hiavata .....		61
Deziras Korespondi .....		63

*Bildo sur Kovrilo:* Du amikoj de Esperanto en la Usona Kongreso en Washington, Senatano R. W. Yarborough el Texas (maldekstre) kaj Rerezentanto R. C. Pucinski el Chicago, antaŭ mikrofono de Voĉo de Ameriko. Ambaŭ parolis en Esperanto en la unua programo, kiun la Voĉo de Ameriko dissendis en tiu lingvo. Malantaŭ Senatano Yarborough kaj Rerezentanto Pucinski staras D-ro William Solzbacher, Membro de la Akademio de Esperanto kaj estro de la Esperanto-programoj de la Voĉo de Ameriko.

---

*"The Association will not knowingly admit as members persons who are Communists or Fascists or others who seek to overthrow the Government of, or in the interests of a foreign power seek to weaken, the United States, or to change its form of government by other than constitutional means." – EANA Constitution.*

Subscriptions in the United States and Canada: \$3.00 per year.  
Jarabono eksterlande por kalendaraj jaro: \$1.50 aŭ egalvaloro.  
Gratis to Members of the EANA.

Regular Membership in EANA – \$5.00 per year. Patron – \$10.00.  
H. S. or College Student & Armed Forces – \$3.00 per year.  
Sustaining Board – \$3.00 or more per month.

# AMERIKA ESPERANTISTO

Vol. 73

DECEMBRO 1960

N-ro 4

## TODAY'S WORLD NEEDS ESPERANTO

PAUL NYLÉN

In March 1958, in an obituary for Paul Nylén, the Swedish Esperanto pioneer, who died on January 14, 1958, at the age of 87, we announced our intention to reprint in his honor an article which he wrote in Swedish and which the *American Esperanto Magazine* published in English in September 1949. We print it without any changes because it is still timely and to the point. Paul Nylén learned Esperanto as a student at the University of Uppsala, in 1892. He later became Editor of the famous Esperanto journal *Lingvo Internacia*. A veteran journalist, he worked many years on the editorial staff of the renowned daily newspaper *Stockholms Tidningen*. A member of the Union of Swedish Journalists since its foundation in 1901, and of the Stockholm Publicists' Club since 1905, he represented Sweden's newspapermen at an International Congress in Belgium, in 1905, as well as on several other occasions. As a sideline, he edited the professional journal of the Union of Swedish Police Officials. When the Iranian government sent police officers to Sweden for training, Nylén learned Persian to be more useful to them. The many positions which he held in the Esperanto movement included that of President and Honorary President of the Swedish Esperanto Federation and that of Member and Vice President of the International Esperanto Academy. Paul Nylén was a friend and admirer of the *American Esperanto Magazine*.

The language situation in Europe and the world is at present not only highly unsatisfactory but – to quote *Professor Björn Collinder* of the University of Uppsala – “outright humiliating.” There is a crying need for a common tongue.

Here in Sweden the attempt has been made to solve the problem by the intensive teaching of English. Competent teachers are trying hard to acquaint our elementary school children with this language. Formerly, we studied foreign languages only in high schools and universities. With what results? – one may ask. At the close of extensive university studies, a scholar was finally able to read foreign books, but not – except in very rare cases – to write the language correctly, and even less to use it extemporaneously and convincingly in a debate. The League of Nations and other international assemblies demonstrated this abundantly. Does any one really believe that in the future our elementary school graduates will have better luck? Shall we stubbornly persist in steering a course which demonstrably leads nowhere for an overwhelming majority of our scholars and for practically all the common people? Or is it too arrogant to suggest that it may be worth while to try out new ways and means?

The real problem, the burning question, is the introduction of a *second language for all*, as a supplement to everyone's tongue. The ideal solution would consist in an arrangement under which all educated per-

sons and all men and women who have any business outside their own nation would become bilingual, using their respective mother tongues at home, and the second language abroad. Call it the world language, the international language, the auxiliary language or whatever you please.

There are, of course, a great many persons who, for one reason or another, wish to study the language and literature of some other nation. So it has always been, and so it will remain. But our era, with its world-circling and rapid communications, needs a channel of understanding for worldwide use, an easy and streamlined means of communication, simpler and more accessible than any of the complicated national tongues. Many scholars and others who have given this problem their thought and their research have reached the conclusion that only a language specially constructed for this purpose, a *planned language*, can fulfill the requirements of a world auxiliary tongue.

But something more than this conclusion was needed. When in 1887 the Warsaw oculist, *Dr. L. Zamenhof*, under the pen name *Doktoro Esperanto*, published his *international language*, it proved to be a striking discovery. *Leibnitz*, the great philosopher, had planned a "catalogue of words and ideas" looking somewhat like a system of algebraic formulas. *Schleyer* had constructed *Volapuk* on the basis of artificial words which, like carved pegs, were unable to strike root in the living ground of language. *Zamenhof*, however, started out from the living words in the vocabulary of Western civilization. This was his epoch-making invention, his Columbus egg. From the rich, all too rich, reservoir of Western languages he selected a limited basic vocabulary containing the words absolutely necessary for every-day needs in any language. Since "international" words are automatically part of Esperanto and are largely of Latin origin, *Dr. Esperanto's* international language became in fact a modern Latin. A number of prefixes and suffixes, always with the same meaning, multiply the words available and make the language flexible and capable of expressing fine shades of meaning. The grammar has been cut down to the bone, dispensing with all the variations and decorative complications of national tongues. In spite of this, Esperanto has proved that it can be used effectively, even for oratory and poetry.

A great deal more could be said about the language, its history, and its practical uses. It is a unique phenomenon in the history of mankind that hundreds of thousands of people from the most different nations of the world have given life, growth, and stability to a language which is no one's mother tongue, but which everyone learns in order to be able to understand the others and to converse with them on a basis of equality. For sixty years, the advocates of Esperanto have used it among themselves, thus carrying out a significant and large experiment, which has produced indisputable evidence that a planned language is possible and that it has become a living fact.


Readers who wish to learn more about Paul Nylén and the Esperanto movement will find the book *50 Jarojn kun Paul Nylén* an exciting reading. Large format, 64 pages, 146 illustrations. A condensed history of Esperanto, as reflected in the life of one of its earliest and most likeable advocates. 85c postpaid.

## VOICE OF AMERICA ESPERANTO PROGRAMS

*The Voice of America* broadcast three series of Esperanto programs in 1960 and is planning to broadcast a fourth early in 1961, probably in March. The first series, consisting of six 30-minute programs, went on the air in March and April, the second, consisting of three programs including two repeats, in June and July, the third, also consisting of three programs, in October and November. In order to reach audiences in different parts of the world, each program was broadcast at different hours to several target areas. The October-November series, for instance, which was devoted to the American elections, went over a network of six shortwave stations. Two of these, located at Delano, California, used antennas beamed to Latin America. Two others, at Tangier, Morocco, broadcast to Europe and the Near East. A transmitter in Okinawa was beamed to Japan and Korea, a transmitter in Manila to Southeast Asia, including Indonesia. Ambassador George V. Allen, who headed the United States Information Agency up to December 1, when he left government service, called the results of the Esperanto broadcasts "encouraging." Up to the end of November 1960 the Voice of America received approximately 1230 letters in Esperanto from 72 countries, including about fifty from countries behind the Iron Curtain.

*Prominent Americans* participated in the Esperanto programs of the Voice of America in an effort to use the language as an instrument of informing a worldwide audience about American democracy and American culture. USIA Director George V. Allen, Senator Ralph W. Yarborough of Texas, and Congressman Roman C. Pucinski of Chicago, made statements in Esperanto on the first program. A Question-and-Answer Program handled questions received from all over the world, some of them from very important people. A question received in Esperanto from the Honorable Franz Jonas, Mayor of Vienna, Austria, on why there is no Mayor of Washington, was answered by Senator J. Glenn Beall of Maryland, the ranking minority member of the District of Columbia Committee of the United States Senate. A question from a member of the Upper House (Senate) of the Swedish Parliament, Einar Dahl, on women in Congress was answered by Congresswoman Marguerite Stitt Church of Illinois, a member of the Foreign Affairs Committee of the House of Representatives. A question from the former Prime Minister of the Netherlands, Dr. Willem Drees, about the difference between the parliamentary system of government, as practiced in a majority of European countries, and the Presidential form of government, as it exists in the United States, was answered by Congressman Pucinski. Congresswoman Church and Congressman Pucinski gave part of their answer in Esperanto. In both cases the rest of the answer was read by an announcer. Senator Beall's voice was briefly heard in English, before his answer was read in Esperanto by an announcer. There was also a question from a prominent Polish scientist, Dr. Andrzej Grębecki, who is connected with the Polish Academy of Sciences and the University of Warsaw. The answer was given by Dr. Alan T. Waterman, Director of the National Science Foundation, whose voice was briefly heard in English and whose full answer was then read in Esperanto by an announcer.

## ESPERANTO IN ACTION AROUND THE WORLD



A "**Report on the Teaching of Esperanto** from 1948 to 1960," by Norman Williams, M. A., was recently published in England. It describes the results of six experiments conducted at the Egerton Park County Secondary School in Lancashire, especially a comparison of progress made in Esperanto with progress made in French. The principal conclusions are: (a) Esperanto is many times easier to learn than French. Thus, far more children can tackle it with a reasonable chance of success... (b) Esperanto can be successfully taught by a teacher who has been learning the language for only a short time... (c) Learning a foreign language improves a child's attainment in English, even when the time devoted to the teaching of the foreign language is deducted from the time previously devoted to the teaching of English. This improvement is greater for Esperanto than for French. (d) Greater progress is made in learning French when the scholar is first taught Esperanto. Children who learn Esperanto for one year and then French for three, reach a higher standard in French than those who learn French alone for four years. And they have the advantage of knowing some Esperanto as well. (e) A preliminary course in Esperanto is a very satisfactory method of discovering whether a child has the ability to learn a foreign language.

**The Danish Minister of the Interior**, Soren Olesen, discussed "Esperanto: The Solution of the International Language Problem" in a broadcast over the Danish radio on September 30, 1960. He mentioned that he himself learned Esperanto years ago and emphasized the tremendous advantages that can be obtained by the use of this easy-to-learn interlanguage.

**The Italian Minister of Education**, Signor Bosco, served on the sponsoring committee of the 31st Italian Esperanto Congress at Cortina d'Ampezzo in September 1960, with the participation of approximately 300 delegates from all over Italy and of numerous guests from abroad. It was the fiftieth anniversary of the Italian Esperanto Federation.

**An International Congress of Catholic Pharmacists**, held in Paris in September 1960, had an Esperanto section.

**The International Christian Esperanto League** had a successful conference at Hedenese, Netherlands, not far from the Belgian border.

**A World Esperanto Congress** to be held in Tokyo, Japan, is planned for 1965. Preparatory work has begun. Japan has one of the most effective Esperanto movements in the world. Numerous Japanese scientists have used the language for books, magazine articles, and summaries.

**The German Federal Government** subsidizes an Esperanto Youth Conference at Oldenburg, between Christmas and New Year. Problems of South America and Western Hemisphere Cooperation are on the program.

**The Brazilian film producer Lima Bareto** plans to bring out one of his motion pictures in an Esperanto version for worldwide distribution.

**The use of Esperanto in information and propaganda** activities of various governments is exemplified by publications of the German Federal Republic and the Polish People's Republic. In 1958, when the Universal Esperanto Congress was held in Mainz, Germany, the German Federal Government published a beautifully printed and illustrated booklet, *Faktoj pri Germanujo*, "Facts about Germany," in Esperanto. The first edition (72 pages, more than a hundred illustrations, several maps and charts) was distributed among the members of the Mainz Esperanto Congress and also mailed all over the world. One map showed parts of East Germany "at present under Polish administration," and one chapter stated that Germany's Eastern areas are under Polish and Soviet administration "until the conclusion of a peace treaty." In 1959, when the World Esperanto Congress was held in Warsaw, the Polish government issued an illustrated booklet in Esperanto, *Polaj Okcidentaj kaj Nordaj Teritorioj*, "Poland's Western and Northern Territories," also with numerous illustrations and a map, to counteract the Germany booklet. Copies were presented to all members of the Warsaw Esperanto Congress and then mailed all over the world. In 1960, when the Universal Esperanto Congress was held in Brussels, the German Federal Government issued a second edition of *Faktoj pri Germanujo*, considerably enlarged and brought up to date. Copies were presented to all members of the Brussels Congress. Polish members of the Congress violently protested. Whether there will be a 2nd edition of *Polaj Okcidentaj kaj Nordaj Teritorioj* we do not know.

**In Hong Kong** an Esperanto Study Group has been formed at the local United Nations Association.

**Brazilian schools teaching Esperanto** are rapidly becoming more numerous. In three schools of São João de Mériti, in the State of Rio de Janeiro, 80 boys and girls are enrolled in Esperanto classes.

**In Uruguay** a weekly radio program devoted to Esperanto was started recently over the Emisoras Real de San Carlos, under the direction of Señor Valdo E. Pons. It is on the air every Saturday night.

**An international essay contest**, sponsored by the Scout Esperanto League, will be open to contestants from all over the world from January 1 through December 31, 1961. Essays of not less than 250 words may discuss any one of these three subjects: (1) How Scouting Makes Our Youth More Mature; (2) Scouts as World Citizens; (3) How to Make a Scout Troop a Success. Contestants must be members of the Scout Esperanto League. Address of the General Secretary: Charles Bardsley, 42 Westbourne St., Oldham, Lancs., England.

**A petition signed by 800,000 parents** was presented to the Dutch Ministry of Education in the Hague, urging the teaching of Esperanto in the schools. The Minister of Education, Arts, and Sciences, Dr. Joseph Cals, is now drafting a plan for the teaching of Esperanto in the so-called ULO Schools (corresponding roughly to junior high schools in the United States) on an optional basis. The plan has to be voted on by both Houses of Parliament before going into effect.

**In the French city of Perpignan** Esperanto is currently taught in ten public schools, in four of them on a compulsory basis.

**International Ski Holidays**, at which Esperanto is used, are organized for the winter 1960/61 at Adelboden in the Swiss Alps, and at Filzmoos in the Austrian Alps. Past affairs have been very successful.

## ESPERANTA KRONIKO



**Memorigaj Poŝtmarkoj en Brazilo:** Laŭ peto de la Brazila Esperanto-Ligo, la registaraj instancoj de tiu lando eldonis novan poŝtmarkon memorige al la centjaro de Zamenhof. Vidu ĝin maldekstre. Ĝia koloro estas verda, valoro Cr\$ 6.50 (proks. 4¢). Eldonkvanto estas 6,000,000. En Brazilo tiu estas la sepa poŝtmarko en Esperanto. Tio metas la landon en elstaran pozicion sur tiu kampo. Listo de la antaŭaj brazilaj poŝtmarkoj estas: 1935-8a Internacia Specimena Foiro... Cr\$ 0,20 1936-9a Internacia Specimena Foiro... Cr\$ 0,20 1937-9a Brazila Kongreso de Esp. ... Cr\$ 0,30 1937-Jubileo de Esperanto... Cr\$ 0,30 1945-10a Brazila Kongreso de Esp... Cr\$ 0,40 1945-10a Brazila Kongreso de Esp... Cr\$ 1,20

**Du Novaj Lingvoj! "Logography" kaj "Tocharian":** Dank' al la ĉiam helpaj informoj de Ssgt. *James C. Faughnan*, en la usona mararmeo, ni povas priskribi du tre malsimilajn lingvojn. La nova "Logography" estas "lingvo de numeroj" elpensita de D-ro Lipschitz Binem, pola kuracisto. Li utiligas unu komunan numeran simbolon por ĉiu vort-ideo en ĉiuj lingvoj. Ekzemple - "Mi amas vin!" fariĝas "1547 1819 4003"! Certe sufiĉe da "amo" se oni adicias la ciferojn! La nove eltrovita lingvo "Tocharian" estis vivanta en Centra Azio inter la 5-a kaj 10-a jarcentoj. D-ro George S. Lane, Universitato de Nord-Karolino, estas la ĉefa aŭtoritato pri tiu "perdita" lingvo. Oni nur malkovris ĝin proksimume je la komenco de la nuna jarcento. "Tocharian" estis hindo-eŭropa lingvo ĉirkaŭita de aziaj lingvoj en tiu frutempo. Ĝi estis anstataŭigita de lingvoj de la turka gento, kiu vivis en la sama regiono.

**Grava Rezolucio pri Blinduloj adoptita en Romo:** La estro de la Esperantistaj blinduloj en Usono, *J. Henry Kruse, Jr.*, sendis la jenan rezolucion. "La Tutmonda Konsilantaro por la Bonstato de Blinduloj, Romo 1959, rekonas Esperanton kiel efektivan rimedon por kontakto inter blinduloj de ĉiuj landoj. La monata gazeto en brajlo, 'Esperanta Ligilo', donas informojn pri blinduloj tra la tuta mondo, kaj preskaŭ mil blinduloj en pli ol tridek landoj legas ĝin. Granda nombro de personoj en multaj landoj konstante korespondas en Esperanto, kiu estas ilia nura rimedo por internacia kontakto. Ĉiujare blinduloj havas oportunon por diskuti siajn problemojn ĉe la Universala Esperanto-Kongreso. Konsiderante tiujn faktojn, la Ĝenerala Asembleo de la Tutmonda Konsilantaro por la Bonstato de Blinduloj 1959 esprimas sian konsenton pri la internacia klopodado por blinduloj pere de Esperanto, kaj rekomendas al internaciaj kaj naciaj organizoj, kaj lernejoj por blinduloj, ke ili utiligu Esperanton kiel efikan rimedon por tutmonda interkomunikado."

**Kompleta Islanda-Esperanta Vortaro:** La Islanda "Althing", kredeble la plej malnova ekzistanta parlamento en la mondo, ĉar ĝi kunvenis por la unua fojo ĉe Thingvellir en la jaro 930-a, donis subvencion de 10,000 kronur al la Islanda Esperanto-Federacio por la publikigo de kompleta Islanda-Esperanta vortaro. La manuskripto de la vortaro estas preta. La aŭtoro, Baldvin B. Skaftfell, verkis pri ĝi dum 7 jaroj.

*Ni ne presas novaĵojn kaj raportojn pri elstaraj personoj, kursoj, kaj kluboj en ĉi tiu numero. Sendu viajn novaĵojn por sekvonta AE.*



# KANTO PRI HIAVATA

Henry W. Longfellow

Tr. Ernest G. Dodge

(Jen la tria parto de la poemo, kiu komenciĝis en AE, N-ro 2, 1960.)

## Kanto V

### Fastado de Hiavata

Aŭdu kiel Hiavata  
Fastis, preĝis en arbaro,  
Ne por lerto en ĉasado,  
Nek sukcesa fiŝkaptado,  
Nek triumfo en batalo  
Kun milita famo, gloro,  
Sed por bono de l' popolo,  
Avantaĝo de l' nacioj,  
Por fastado li unue  
Faris en arbar' loĝejon,  
Ĉe la brila Grandmar-Akvo,  
Dum printempo tre agrabla,  
Dum Monato de l' Folioj.  
Do, kun revoj kaj vizioj,  
Tagonoktojn sep li fastis.

Dum unua fastotago  
En arbaro foliriĉa  
Li vagadis, vidis cervojn  
Ekkurantaj el densejo,  
Kaj kuniklojn en tuneloj;  
Aŭdis la fazanon, Bena,  
Tamburanta, la sciuron,  
Aĝidaŭmo, klaketanta  
Inter glanoj, kaj kolombon,  
La Omeme, nestfaranta  
Sur pinarbo, kaj sovaĝan  
Anseregon, Vava, grege  
Flugadanta al nord-marĉoj,  
Krie super li zumanta.  
"Mastro de la Vivo!" kriis  
Li kun malespero, "Ĉu ni  
Sur ĉi tiuj dependados?"

Dum la dua fastotago  
Laŭ riverobord' li vagis,  
Tra herbejo, Muskodejo,  
Vidis la sovaĝan rizon,  
Kaj bluberon, la Minahga,  
Kaj la fragon, la Odahmin,  
Kaj la grosan, la Ŝahbomin,  
Vinberujon, la Bemahgut,  
Rampan sur la alnobranĉoj,  
Parfumanta la aeron.

"Mastro de la Vivo!" kriis  
Li kun malespero, "Ĉu ni  
Sur ĉi tiuj dependados?"

Dum la tria fastotago


Ĉe la lag' li sidis pense,  
Ĉe la muta, klara akvo;  
Vidis sturgon, Nahma, salti,  
Ŝpruciganta akvon supren;  
Vidis flavan perkon, Sahva,  
Kvazaŭ suno en la akvo,  
Kaj ezokon, Maskenozha,  
Kaj haringon, Okahahvis,  
Kaj la kankron, la Ŝaŭgaŝi!  
"Mastro de la Vivo!" kriis  
Li kun malespero, "Ĉu ni  
Sur ĉi tiuj dependados?"

Dum la kvara fastotago  
Kusis li ellaciĝinta,  
Rigardadis el branĉlito,  
Kun okuloj duonfermaj,  
Songoplana kun vizioj,  
Vidis ŝvebon de l' pejzaĝo,  
Ekbriladon de la akvo,  
Gloron de la sunsubiro.

Kaj li vidis junan viron  
Alpaŝanta, en vestaĵoj  
Hele flavaj, bele verdaj,  
Alpaŝanta tra l' purpuro  
De l' krepusko sunsubira;  
Verdaj plumoj sur la frunto,  
Kaj hararo mole ora.

Stare ĉe la pordo, longe  
Li rigardis Hiavata'n  
Kompateme, al velkinta  
Formo ties kaj vizaĝo.  
Kaj per voĉo kiel flustro  
En arbar', de l' Suda Vento,  
Diris li, "Ho Hiavata!  
En ĉielo viaj preĝoj  
Estas ĉiuj akceptitaj,  
Ĉar vi ja alie preĝas,  
Ne por lerto en ĉasado,  
Nek sukcesa fiŝkaptado,  
Nek triumfo en batalo  
Kun milita famo, gloro,  
Sed por bono de l' popolo,  
Avantaĝo de l' nacioj.

"De la Mastro de la Vivo  
Venas nun amik' de l' homo,  
Suben venas mi, Mondamin,  
Por averti vin, instrui  
Kiel per klopod', laboro,  
Gajnos vi la preĝajn petojn.



Supren nun! el lit' folia;  
Supren nun! kaj luktu kun mi!"

Svena pro la malsatego,  
El la lito folibranta  
Ekstarigis Hiavata;  
El la ombro de vigvamo  
Venis li je sunsubiro,  
Venis, luktis kun Mondamin.  
Lin tuŝinte, li eksentis  
Novan forton pulsetantan  
En la brusto kaj la cerbo,  
Sentis vivon, certon, viglon  
En la nervoj kaj muskoloj.

Tiel luktis ili kune  
Dum la glora sunsubiro;  
Kaj ju pli luktadis ili,  
Des pli fortis Hiavata,  
Ĝis mallumo ĉirkaŭrampis,  
Kaj ardeo, la Ŝu-ŝu-gah,  
El la nesto ĉe pinarboj  
Eklamentis vekriante;  
Kriis ŝi malsatdolore.

"Nun sufiĉas, Hiavata!"  
Diris kun ridet' Mondamin.  
"Morgaŭ tamen, sunsubire,  
Ree vin mi lukte taksos."  
Kaj Mondamin malaperis;  
Ĉu subflue, kiel pluvo,  
Ĉu nebule sin levanta,  
Hiavata ne ekvidis;  
Vidis nur ke li ne estis.  
Hiavata restis sola,  
Restis svena kaj malforta,  
Kun nebula lago sube,  
Ŝvedancaj steloj supre.

Sed je morgaŭ kaj post morgaŭ,  
Kiam suno suben iris,  
Kiel ruĝa fajropeco  
El fajreg' de l' Grand-Spirito,  
En la akvojn okcidentajn,  
Tiam venis li, Mondamin,  
Por luktprovi Hiavata'n,  
Tre silente kvazaŭ roso,  
Kiu el aero venas,  
En aeron malaperas,  
Prenas formon tertuŝante,  
Sed por homoj nevidebla  
Dum alveno kaj foriro.

Ili fojojn tri luktadis  
Dum la glora sunsubiro,  
Ĝis mallumo ĉirkaŭfalas,  
Ĝis ardeo, la Ŝu-ŝu-gah,  
El la nesto ĉe pinarboj  
Ekvekriis malsatante  
Kaj Mondamin ŝin aŭskultis.



Alta, bela li firmstaris  
En vestaĵo flava, verda;  
Super li la belaj plumoj  
Tien reen sin flirtadis,  
Ŝvebis dum spirado lia;  
Kaj la ŝvito de luktado  
Kiel roso sur li restis.

Kaj li kriis, "Hiavata!  
Brave kun mi vi luktadis,  
Fojojn tri kun verve luktis;  
Vidis Mastro de la Vivo,  
Donos li al vi triumfon!"

Kaj ridete li plu diris:  
"La morgaŭ por vi estos  
Lasta tago de luktado,  
Lasta tago de fastado.  
Vi min venkos, suben premos.  
Vi konstruu por mi liton,  
Kie pluvo sur min falos,  
Kie suno min varmigos;  
Ĉi vestaĵojn flave verdajn  
Kaj plumaron, vi forŝiru,  
Min kuŝigu en la teron;  
Super mi la teron daŭre  
Vi moligu, pulvorigu.

"Min ne ĝenu dum dormado  
Nek la vermo, nek herbaĉo;  
Min ne tuŝu ies mano;  
Kah-gah-gi', la granda korvo,  
Ne alvenu, nek ataku.  
Vi — nur vi — alvenu garde  
Ĝis vekigos mi, viviĝos,  
Ĝis mi saltos en sunbrilon."

Parolinte, li foriris.  
Pace dormis Hiavata;  
Sed li aŭdis kaprimulgon,  
Vavonejsa, lamentanto,  
Eksidanta sur vigvamo;  
Aŭdis kuran rivereton,  
Plaŭde fluan en apudo,  
Babilanta al ĉirkaŭa  
Arbarego tre malluma;  
Aŭdis spiron de la branĉoj  
En levigo, mallevigo,  
Dum la noktovento pasis,  
Ilin aŭdis, kiel oni  
Dum dormado aŭdas forajn  
Sonĝe dolĉajn etmurmurojn.  
Pace dormis Hiavata.

Venis je maten' Nokomis,  
En la sepa fastotago,  
Portis ŝi al li manĝaĵon,  
Petegante, lamentante,  
Ke mortigos lin malsato,  
Ke fatala estos fasto.

Li ne tuŝis, ne gustumis  
Ĝin, sed diris nur, "Atendu  
Ĝis la sunsubir', Nokomis,  
Ĝis mallumo ĉirkaŭfalos,  
Ĝis ardeo, la Ŝu-ŝu-gah,  
Krie el solecaj marĉoj  
Diros ke la tag' finiĝis."

Hejmen ŝi plorante marŝis  
En dolor' pri Hiavata,  
Timis, ke la forto mankos,  
Ke fatala estos fasto.  
Sed li lace atendadis  
Por alveno de Mondamin,  
Ĝis la ombroj orienten  
Plilongiĝis sur herbejo,  
Ĝis la suno suben iris,  
Kvazaŭ flose sur la akvo,  
Kiel la folio ruĝa  
En aŭtuno falas, naĝas,  
Kaj subiĝas en la akvo.

Tiam, jen! junul' Mondamin,  
Kun hararo mola, brila,  
Kun vestaĵoj flava, verda,  
Kun plumaro longa, glata,  
Staris ĉe la pord' kaj gestis.  
El vigvamo Hiavata  
Kvazaŭ en dumdorma marŝo,  
Pala, velka, sed ne tima,  
Venis, luktis kun Mondamin.

Ĉirkaŭ li pejzaĝo kirlis,  
Ŝanceliĝis la ĉielo,  
Ŝanceliĝis la arbaro;  
Kaj en li la koro saltis,  
Kiel sturgo salte luktas  
Kontraŭ maŝoj de la reto.  
Kiel fajroringo brulis  
Ruĝa horizonto ĉie,  
Kvazaŭ sunoj cent rigardis  
La batalon de luktantoj.

Kaj subite sur herbaro  
Sola staris Hiavata,  
Spasme spiris pro laboro,  
Koro batis pro luktado;  
Kaj apude ja senspira  
Kaj senviva la junulo  
Kuŝis kun harar' taŭzita,  
Kaj vestaĵoj ĉifonitaj,  
Kuŝis morta en krepusko.

La venkinta Hiavata  
Fosis tombon laŭ ordono,  
Tiris for de la mortinto  
La vestaĵojn, la plumaron,  
Lin kuŝigis en la teron,  
Ĝin moligis, pulvorigis.  
Kaj ardeo, la Ŝu-ŝu-gah,

En melankoliaj marĉoj,  
Donis krion de lamento,  
Krion de dolor', mizero!

Hejmeniris Hiavata  
Al logejo de Nokomis,  
Ĉar la tagoj sep de fasto  
Plenumiĝis kaj finiĝis.  
Sed li ne forgesis kie  
Li mortluktis kun Mondamin,  
Ne forgesis nek neglektis  
Li la tombon de Mondamin,  
Kie dormis li sub pluvo,  
Dormis sub la sunbrilado,  
Kie ties plumoj, vestoj,  
Pro la pluv' kaj sun' paliĝis.

Ĉiutage Hiavata  
Ĉe la tombo gardestaris,  
Faris grundon mola sur ĝi,  
Ĝin purigis de insektoj  
Kaj herbaĉoj ĉiuspecaj,  
Pelis for per mokokrio,  
Kah-gah-gi', la reĝokorvon.

Fine, verda plum' gracila  
El la tero suprenkreskis,  
Jen alia kaj alia.  
Antaŭ fino de somero  
Staris la maizo bela,  
En vestaĵoj bele brilaj,  
Plumoj molaj, flavaj, longaj.  
Kaj en ravo Hiavata  
Kriis laŭte, "Jen Mondamin!  
La amiko de l' homaro!"

Kaj li montris al Nokomis  
Al Iagu fanfaronu,  
Kie la maizo kreskis.  
Li rakontis pri vizio,  
Pri luktado, pri triumfo,  
Pri donaco nova, jena,  
Por la bono de l' nacioj,  
Kiu estos porĉiame  
La mangajo de l' popolo.

Poste kiam la aŭtuno  
Tuŝis la maizfoliojn,  
Faris ĉion verdan flava,  
Kiam la grenero sukaj  
Malmoliĝis kaj flaviĝis,  
Li rikoltis la spikegojn,  
Tiris for la velkajn kovrojn,  
Kiel iam li nudigis  
Post luktado la luktanton.

Tiam li unuan Feston  
De Mondamin oferdonis,  
Kaj proklamis al popolo  
Tiun grandan, novan donon,  
Donon de la Grand-Spirito.



## Kanto VI

### Amikoj de Hiavata

Du amikojn Hiavata  
Havis en plej alta grado,  
Elstarantaj el aliaj;  
Kaj al kiuj li la dekstran  
Manon de la koro donis,  
Ĉu en ĝojo aŭ malĝojo:  
Ĉibiabos, muzikisto,  
Kaj plej forta viro, Kvasind.

Inter ili estis vojo  
Ĉiam rekta kaj senherba;  
Mensogemaj kantobirdoj  
Kaj klaĉuloj misparolaj  
Trovis ilin malaŭskultaj,  
Do ne povis inter ili  
Malakordon fikreskigi.  
La sekretojn reciproke  
Tenis ili, ĉar parolis  
Ili kune nudakore,  
Meditante kaj planante  
Por prosper' de homaj gentoj.

Pli amata el la du  
Estis milda Ĉibiabos,  
Plej bonega muzikisto,  
Plej dolĉega el kantantoj;  
Bela, li, infansimila,  
Plenkuraĝa kiel viro,  
Kortuŝebla kiel ino,  
Fleksebla kiel branĉ' salika,  
Kaj majesta kiel cervo,  
La vircervo kornohava.

Kiam kantis li, bravuloj  
Kaj virinoj de l' vilaĝo  
Ĉirkaŭsidis kaj aŭskultis.  
Jen pasion li inspiris,  
Jen kompaton en la koroj.

El la kanoj li fabrikis  
Flutojn tiel molmuzikajn,  
Ke flueto, Seboviŝa,  
Ĉesis en arbar' murmuri,  
Ke la birdoj ĉesis kanti,  
Ke sciuro, Aĝidaŭmo,  
Ĉesis klaki en kverkarbo,  
Kaj kuniklo, la Vabaso,  
Rekte sidis por aŭskulti.

Jes, flueto, Seboviŝa,  
Paŭzis, diris, "Ĉibiabos!  
Instruadu miajn ondojn  
Muzikadi tiel mole,  
Flue kiel via kanto."

Jes, Ovajsa, birdo blua,  
Enviemis, "Ĉibiabos!  
Instruadu al mi tonojn

Tiel bele petolecajn,  
Kun sovaĝa korekstazo."  
Jes, Opeĉi, rubekolo,  
Ĝoje diris, "Ĉibiabos!  
Min instruu tiel mole,  
Kortuŝante kanti tonojn,  
Kantojn tiel ĝojoplenajn!"

Kaprimulgo, Vavonejsa,  
Plore diris, "Ĉibiabos!  
Min instruu kanti tonojn  
Tiel melankoliecajn,  
Tiel plenajn je malĝojo!"

Ĉiuj natursonoj prenis  
Dolĉon de la kantoj liaj;  
Homaj koroj plimoliĝis  
Pro patoso de l' muziko;  
Ĉar pri paco kaj libero  
Kantis li, kaj pri beleco,  
Pri sopiro kaj pri amo,  
Jes, pri morto kaj pri vivo,  
Vivo, kiu ĉiam daŭros  
En Insuloj de l' Benitoj,  
En la regno de Ponemah,  
En la lando de l' Estonto.

Kara tre al Hiavata  
Estis milda Ĉibiabos,  
Li, plej bona muzikisto,  
Li, plej dolĉa el kantantoj;  
Lin li amis pro mildeco,  
Kaj magio de l' kantado.

Kara ankaŭ al li estis  
La fortega viro, Kvasind,  
Plej potenca el mortuloj,  
Superforta inter multaj.  
Lin li amis pro la forto,  
Tre parenca al boneco.

Malagema dum juneco  
Estis Kvasind, kaj revema,  
Ludis ne infanajn ludojn,  
Ne fiŝkaptis, ne ĉasiris,  
Ne similis aliulojn;  
Oni vidis lin fastanta;  
Al la Manito' tre multe  
Li petegis, ofte preĝis  
Al la Gard-Spirito sia.

"Tre mallaborema Kvasind!"  
La patrino lin riproĉis,  
"Min labore vi ne helpas,  
En Somero vi vagadas  
Vane en arbaroj, kampoj;  
En la Vintro vi kaŭradas  
Ĉe la fajro en vigvamo!  
En plej frostaj vintroj tagoj,  
Ĉiam devas mi trarompi  
La glacieron, fiŝkaptante,



Pri la retoj vi ne helpas!  
Ĉe la pordo retoj pendas  
Akvoplenaj, frostiĝantaj;  
Ilin tordu, Jenadize!  
Tordu ilin, malsekigu  
Ilin en la sunbrilado!"

Malrapide el la cindroj,  
Kvasind sen respond' leviĝis,  
El loĝej' silente iris,  
Prenis retojn frostiĝantajn  
Kaj gutantajn ĉe la pordo,  
Kiel pajlon tordis ilin,  
Kiel pajlon rompis ilin  
Per la manoj. Li ne povis  
Tordi ilin sen disrompo,  
Tiel fortaj liaj manoj.

"Tre mallaborema Kvasind!"

Patro lia lin riproĉis,  
"En la ĉaso vi ne helpas;  
Ĉiu ark' rompita estas,  
Ĉiuj sagoj frakasitaj,  
Pro la tuŝo via. Tamen  
Kun mi en arbaron veni,  
Portu hejmen la ĉasaĵon."

Laŭ vojeto ili vagis,  
Laŭ la flu' de rivereto,  
Kie spuroj de bizonoj  
Kaj de cervoj koton markis,  
Ĝis pluiron trovis ili  
Per arbtrunkoj plenbarita;  
Elradikigitaj trunkoj,  
Kaj transversaj kaj laŭlongaj,  
Malpermesis pluan iron.

"Nun ni devas reen iri,"

Diris la maljuna, "Ni ne  
Povos super ŝtipoj grimpi;  
Eĉ marmoto ne trarampus,  
Aŭ sciuro supergrimpus!"  
Do la pipon li ekfumis;  
Sidis, fumis, kaj meditis.  
Tamen, antaŭ fumadfino,  
Jen! la vojo malbariĝis;  
Kvasind estis flankĵetinta  
La ŝtipegojn per la manoj;  
La pinarbojn dekstren, malen,  
Ĵetis li per sagrapido,  
Kaj la cedrojn kiel kanojn.

"Malagema Kvasind!" Tiel

La junuloj lin riproĉis,  
Dum ludado sur herbejo,  
"Kial vi rigardaŭs vane,  
Apogate de rokaĵo?  
Venu, luktu kun aliaj,  
Per ĵetringoj ni konkursu!"

Kvasind tute ne respondis,

Al defio ne respondis,  
Nur starigis, malrapide  
Li sin turnis, fingroprenis  
La rokaĵon, la grandegan,  
Ĝin tiregis el la grundo,  
Ĝin altigis en aeron,  
Kaj ĝin ĵetis en riveron  
Tre rapidan, la Paŭvating.  
Tie ĝi ankoraŭ staras,  
Meze de somera fluo.

Foje Kvasind kun kunuloj  
Sur rivero tre ŝaŭmanta,  
La Paŭvating, kanotiris,  
Tra la rapidaĵo flosis.  
Vidis li en ĝi kastoron,  
Ahmik, Reĝon de l' Kastoroj,  
Kontraŭ la flueg' strebantana,  
Jen sub akvo kaj jen super.

Sen paroli, sen eĉ paŭzi,  
Kvasind en la akvon saltis,  
Tra surfaco ŝaŭma plungiĝis,  
Tra kirlieg' kastoron ĉasis,  
Laŭ insuloj ĝin li sekvis;  
Tiel longe restis sube,  
Ke kunuloj en teruro  
Kriis, "Ve! adiaŭ Kvasind!  
Ni ne plu revidos Kvasind!"  
Sed triumfe li aperis,  
Portis sur brilantaj ŝultroj  
La kastoron jam mortintan,  
Reĝon de l' Kastoroj portis.

Tiun paron Hiavata  
Havis kiel koramikojn,  
Du amikojn plej intimajn:  
Ĉibiabos, muzikisto,  
Kaj plej forta viro, Kvasind.  
Ili pace kunvivadis,  
Nudakore kunparolis,  
Meditante kaj planante  
Por prosper' de homaj gentoj.

## Kanto VII

### Boatado de Hiavata

"Donu al mi, ho Betulo,  
Arboŝelon, ho Betulo,  
Vian arboŝelon flavan!  
Vi, kreskanta altstatura  
Ĉe rivero flueganta!  
Mi kanoton tre malpezan,  
La Ĉimaŭn' tre rapidegan,  
Faros por la boatado,  
Por flosado sur rivero,  
Kiel la nufaro flosas,  
Kiel la folio flava  
Sur la akvo en aŭtuno.



"Vi demetu, ho Betulo,  
La mantelon, blankan haŭton,  
Ĉar somerotempo venas,  
Varmas en ĉiel' la suno;  
Ne bezonas vi mantelon!"

Tiel kriis Hiavata  
En arbaro tre soleca,  
Ĉe l' fluega Takvamenauŭ,  
Kiam birdoj gaje kantis  
Dum la Luno de Folioj,  
Kaj la suno, vekiginte,  
Ekstarigis, diris, "Jen mi!  
Granda Suno, Gizis, jen mi!"

Kaj la arbo susuradis  
En matena mola vento,  
Per ĝemspiro pacienca  
Diris ĝi, "Ho, Hiavata,  
Prenu do mantelon mian!"

Ĉirkaŭtrancis li la arbon  
Sub la plej malaltaj branĉoj,  
Ĝuste ĉe radikoj trancis,  
Ĝis arbsuko gute rampis  
Laŭ la trunko ĝis la tero;  
Li laŭlonge trancis ŝelon,  
Levis ĝin per ligna kojno;  
Ĝin li tiris nerompita  
De la arbotrunko granda.

"Donu branĉojn vi, ho Cedro!  
Fortajn kaj flekseblajn branĉojn,  
Por kanoton plifirmigi,  
Por ĝin fari pli fidinda!"

Tra la supro de la Cedro  
Iris krio de konsterno,  
Murmurad' de nevolemo;  
Tamen ĝi ekflustris cede,  
"Prenu branĉojn, Hiavata!"

Do fortrancis li la branĉojn  
Cedrolignajn, kaj ĉarpentis  
Ilin en kanotskeleton,  
Kvazaŭ arkojn du, en unu  
Kurbon nete fabrikitajn.

"Donu al mi, ho Lariko,  
La radikojn fibroricajn,  
Por kunbindi la kanoton,  
Por kunbindi la finaĵojn,  
Ke la akvo ne eniru,  
Ke neniel la rivero  
Povu min eĉ malsekigi!"

La Lariko, fibrohava,  
En aero frumatena  
Ekremetis ja, sed tuŝis  
Per la kvastoj lian frunton;  
Diris kun malĝoja spiro,  
"Ĉiujn prenu, Hiavata!"

El la grundo li la fibrojn

Eltiregis, la radikojn  
De l' Lariko, tre rezistajn;  
Tiel li kunkudris nete  
Arboŝelon de l' Betulo,  
Kaj ĝin tre firmege bindis  
Al kanotskeleto ligna.

"Donu, ho Abio, parton  
De balzam', rezino via,  
Por fermegi stebliniojn,  
Kie ŝelo ŝelon tuŝas,  
Ke la akvo ne eniru,  
Ke neniel la rivero  
Povu min eĉ malsekigi!"

Kaj l' Abio alta, digna,  
Tra mallumaj vestoj ĝemis,  
Klakis, kiel ĉe lagbordo  
Ŝtonetaro ondbatata;  
Veplorante ĝi respondis,  
"Jen balzamo, Hiavata!"


Alproprigis de l' Abio  
Li la larmojn de balzamo,  
Kaj per ili ŝmiris, fermis  
Stebliniojn kaj fendetojn,  
Kontraŭ akvo sekurigis.

"Donu al mi, ho Histriko,  
Viajn harpikilojn; ilin  
Mi fabrikos en kolĉenon  
Por kanoto, mia bela,  
Stelojn du por ŝia brusto!"

El arbkavo la histriko  
Alrigardis duondorme,  
La pikilojn li forĵetis,  
Dorme murmurante diris,  
"Ilin prenu, Hiavata!"

La pikilojn diskuŝantajn,  
Kvazaŭ brilajn sagojn etajn,  
Li kolektis, kolorigis  
Ilin ruĝaj, bluj, flavaj,  
Per la suko de radikoj  
Kaj diversaj strangaj beroj.  
Ĉirkaŭ la kanotalion  
Metis li brilantan zonon;  
Ĉirkaŭ prupon, la kolĉenon,  
Kaj du stelojn sur la bruston.

Tiel la Betul-Kanoto  
Estis ja finfabrikita  
En la valo, ĉe rivero,  
En la sino de arbaro.  
Ĉio el arbara vivo  
Partoprene en ĝi estis,  
La mistero kaj magio,  
Malpezeco de l' betulo,  
Rezistemo de la cedro,  
De l' lariko la tendenoj.  
Sur rivero ĝi flosadis,



Kiel la nufaro flosas,  
 Kiel la folio flava  
 Sur la akvo en aŭtuno.  
 Sed padelojn Hiavata  
 Ne posedis, nek bezonis.  
 Liaj pensoj kaj deziroj  
 Anstataŭis la padelojn;  
 Li rapide, malrapide,  
 Glitis laŭ plezuro sia,  
 Dekstren aŭ maldekstren glitis.

Tiam li alvokis Kvasind,  
 Fortegulon, koramikon,  
 "Helpu min el la rivero  
 Elforigi sablorifojn,  
 Kaj ŝtipegojn sub la akvo."

Tuj en riveron Kvasind  
 Plunĝis, kvazaŭ estis lutro,  
 Kvazaŭ estis ja kastoro;  
 Akvo venis ĝis la lumbo,  
 Ĝis la brakoj, kaj li vadis,  
 Naĝis en la flu' kriante,

Eltiregis branĉojn, Stipojn;  
 Sablorifojn li elfosis  
 Per la manoj kaj piedoj.

Kaj kanotis Hiavata  
 Laŭ la flu' de Takvamenau,  
 Tra la serpentumoj flosis,  
 Tra l' profundoj, malprofundoj,  
 Dum amiko forta, Kvasind,  
 Tra la profundajoj naĝis,  
 Tra la malprofundoj vadis.

Laŭ la fluo kaj kontraŭen,  
 Inter la insuloj iris  
 Ili, el river' forigis  
 Sablorifojn kaj radikojn,  
 Eltiregis arbotrunkojn,  
 Faris fluon sendanĝera,  
 Faris vojon por la homoj,  
 De la fontoj inter montoj  
 Ĝis la akvoj de Paŭvating  
 Al la golfo Takvamenau.



## DEZIRAS KORESPONDI

- Anglujo.* F-ino Dorothy Harward, 40 Fillingham St., Birmingham 12; 38-j. komercantino dez. kor. tutmonde pri muziko, vojaĝado, libroj, ktp.
- Danlando.* S-ino Ulla Larsen, Gyldesvej 3, Helsingör, dez. kor. kun gesamideanoj en multaj landoj.
- Finnlando.* Esperanta Studrondo, Pahajoki, Alavus-kk., geknaboj 10 ĝis 20-j. dez. kor. tutmonde, il. PK, leteroj, kantoj kun notoj.
- Finnlando.* Antti Laakso, Piippukuja, Lempäälä 2, 23-j. finno dez. kor. kun ĉiuj landoj pri filmarto, literaturo, sporto, kaj PK il.
- Germanujo.* Horst Wendiggensen, Lindenallee 53, Meisenheim/Glan, 14-j. progresinto dez. kor. kun 14 ĝis 16-j. gesamideanoj pri ĉiuj temoj.
- Germanujo.* S-ro Walter Wichmann, Luxemburgplatz 4, Weisbaden, dez. kor tutmonde.
- Hispanujo.* V. Hernández Llusera, Avenida Ej. Español 59, Sabadell, 25 diversaj gekursanoj dez. kor. tutmonde.
- Italujo.* S-ro Mario Mosso, Via Livorno 7, Torino, 30-j. italo dez. interŝ. il. poŝtkartojn kun la tuta mondo.
- Japanujo.* Esperanto-Klubo Ŝoŝibijucu-Daigaku (Virina Belarta Kolegio), 860 Ŭadahun-ĉo, Suginami-ku, Tokio. Multaj studentinoj dez. kor.
- Japanujo.* Esperanto-Rondo, Hibija Supera Duagrada Lernejo, 12-28 Ĉijoda-ku, Tokio, dez. kor. kun 16 ĝis 19-jaraj studentoj.



Ĝojan Kristnaskon  
 Feliĉan Novjaron

## "SAY IT IN ESPERANTO"

by G. Alan and Doris T. Connor

*Tells You What to Say and How to Say it!*

You'll be delighted by the ease with which you'll immediately be saying whole phrases in Esperanto. Practice ordering meals, renting rooms, driving a car, going to a doctor, going shopping, etc., by using this handy manual.

5¼ x 3½ in. for purse or pocket. Over 1000 phrases, many never before translated into Esperanto. A complete index with unique numbering system so that you find the phrase you want instantly. A quality product with strong covers and sewn back. A guide to conversation, with summary of grammar. Useful in Esperanto courses.

*It is a thoughtful, useful gift for friends, too!*

Those who receive it will find much interest in learning to say useful phrases in Esperanto; and will want to go on to a mastery of the interlanguage. Order them in quantity!

*Price only 75¢ each, discounts to groups & dealers.*

*Published by Dover Publications, Inc. Order from EANA.*



only  
75¢

---

## LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Book Service* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower—dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Book Service* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

---

**Esperanto Ass'n of N. A., 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.**